

LA
VERDA
STELO



Esperanto
Nederland

sekcio
Groningen-Drente

septembro 2005



eldono de Esperanto-klubo
GRONINGEN-DRENTE,
sekcio de
ESPERANTO NEDERLAND

Prezidanto :

s-ro J.S. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. 050 527 45 72

Sekretariejo:

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. 050 525 00 86

Kasisto:

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. 050 301 40 15



Kunvenejo:

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas de
la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro :

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J. Swenker, tel. 050 527 45 72

Redakcio:

Koos Scharroo,
Wil van Ganswijk-Vlasblom



Enhavo

- 1 ... Forpasis la kolektinto de la Z-a heredaĵo
- 2 ... Klubvesperoj, naskiĝdatrevenoj
- 3 ... Kio okazis en Groningen?
- 6 ... Kongresa raporto
- 7 ... Alvoko el Francio
- 8 ... Ne ekzistas 'la' ĉina lingvo
- 11 ... Amo kun majusklo 'A'
- 12 ... Diraiĵoj pri la internacia lingvo Esperanto

Contributie afdeling Groningen-Drente

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 11,34
Gezinslid	€ 5,67
Donateur (minimaal)	€ 5,67
Abonnement LA VERDA STELO	€ 5,67

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v. afd. Groningen,
ESPERANTO NEDERLAND te Bedum

Leden van afd. Groningen-Drente worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. ESPERANTO NEDERLAND te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X)	€ 25,00
Gezinslid	€ 7,50

frontopaĝo:

la festa torto pro la centjara jubileo dum la ĝenerala kunveno de la 28-a de majo 2005

Forpasis la kolektinto de la Zamenhofa heredaĵo

La 25-an de aprilo post longa malsano en la laĝo de 87 jaroj forpasis la elstara japana esperantisto ITÔ Kanzi, en Esperantujo pli konata sub la pseŭdonimo Ludovikito. Antaŭ trideko da jaroj li komencis kolekti ĉiun literon, kiu iam lasis la plumon de Ludoviko Zamenhof.



ITÔ Kanzi

En 1973 komencis aperi lia *Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof*, kies volumoj tuj iĝis nepra legaĵo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la historio de la Esperanto-movado.

En 1998 la verkaro de Zamenhof, kun la diversaj kromkajeroj eldonitaj de Ludovikito, havis jam 55 volumojn diversampleksajn, kaj en tiu jaro Japana Esperanto-Instituto donis al li "Specialan honorigon laŭ Akademia Merito". Jam en 1990 Ludovikito iĝis honora membro de UEA.

ITÔ Kanzi pasigis la plej grandan parton de sia vivo en Kioto, kie li ankaŭ studis. Profesie li laboris ĉe la eldonejo Nagasue, kiu specialiĝas je verkoj pri dent-kuracado. Esperanton li eklernis en 1959, unue leginte japanajn tradukojn el la verkoj de la konata blinda rusa esperantisto Vasilij Eroŝenko.

Post sia esperantistiĝo ITÔ Kanzi verkis japane biografian romanegon pri Zamenhof. La japanlingva verko ampleksas sume pli ol kvin mil paĝojn en ok volumoj, el kiuj la unua aperis en 1967 kaj la lasta en 1978. La plumnomo Ludo-

vikito estas kunmetaĵo de la persona nomo de Ludoviko Zamenhof, kaj la familia nomo de ITÔ Kanzi, sed ĝia lasta parto estas ankaŭ scienca sufikso kun la signifo "suferanta je, mania je".

Efektive preskaŭ manie Ludovikito ekde 1973 kolektis, editoris kaj eldonis plenan verkaron de Zamenhof, entute 58 kajerojn ĝis 2004. La plej signifoplenajn originalajn tekstojn de Zamenhof li kolektis en la trivoluma *iom reviziita plena verkaro de l.l. zamenhof* kun entute pli ol 2.800 paĝoj. La titolo efektive estas minuskla, ĉar Ludovikito en siaj propraj tekstoj neniam uzis majuskajn literojn. La verkojn de ludoviko, kiel li kutimis nomi Zamenhof, li kompreneble aperigis precize en tiu formo en kiu ili estis verkitaj, farante grandajn fortostreĉojn por trovi la plej originalan tekston.

Komence Ludovikito nomis sian projekton de plena Zamenhofa verkaro "iam kompletigota", sed kiam ĝi post preskaŭ tridekjara laboro fakte estis preta, li devis spite sian modestecon renomi ĝin "iel tiel kompletigita". Ludovikito ne nur kolektis la materialon kaj grandparte financis la eldonon. Li faris ankaŭ scienca redaktan laboron, kaj krome mem kompostis la verkojn. Li havis enorman korespondadon kun aliaj spertuloj pri la vivo kaj verkoj de Zamenhof.

En 2004 Ludovikito kaj liaj kamaradoj eldonis la pli ol 250-paĝan verkon *pri nia pvz-ado*, en kiu li rakontas pri la historio de la enorma projekto, sed ankaŭ pri sia sinteno al Ludoviko Zamenhof: *mi intencis priskribi ludovikon ne kiel grandan homon, sed kiel ordinarulon, senigante al li tiujn legendojn, per kiuj la esperantistoj deziris lin ornamu kaj beligi.*

Al tiu 'ordinarulo' Ludovikito dediĉis tridek jarojn el sia vivo.

El: Libera Folio, sendependa movada bulteno

Klubvesperoj

septembro

22 La dua bendo *de Pasporto al la tuta mondo*

oktobro

6 Malferma Vespero (evt. gramatiko)

20 Ĉiu rakontu ion pri iu Esperanto-libro

novembro

3 Esperanto-poemoj

17 Gastpreleganto

decembro

1 Ludvespero

15 L.L. Zamenhof

17 Al **Oldenburgo** – vidu aliloke!!



Naskiĝtagoj

aŭgusto

14 J. Reddingius

16 J.W. Scharroo

17 A. Mulder-Drent

30 J.B. Swenker

septembro

3 W. Akkerman

17 H.W.T. v. Hogen-Cornelissen

24 A.E. vd Heij-Alblas

26 G.M. v. Reenen

30 A.H. Thomas-Nitzsche

oktobro

3 D. v.d. Heijden

15 C.H.T. Behr-Kunst

29 A.M.H. Dodebier

novembro

9 J.B. Schouten

10 E.L. vd Roest

decembro

15 H. Molthoop

P. Reddingius- v. Houtum

21 H. Leeuwerke-Kiers

31 A. v.d. Heij

Gratulon!

Kio okazis en Groningen?

La 28-an de aprilo 2005

Wil voĉlegis leteron de *Vadim Hmelinskij*, la verkisto de la urso-libro. Pere de Mikaelo Bronŝtejn li ricevis ekzempleron de nia eldono, en kiu estas ankaŭ la nederlanda traduko. Vadim sciigis, ke ni rajtas uzi la libron kiel varbilon por la lingvo Esperanto. Ni do rajtas ĝin plue vendi.

Ni ricevis inviton el Orienta Frislando pri *ORO* (Orientfrislanda Renkontiĝo). Laŭ la invito organizas ĝin freŝaj esperantistoj. Laŭ la retejo ĝi okazos fine de junio en Emden.

La mandatoj por la jarkunveno de Esperanto Nederland estas subskribitaj. Se do neceso voĉdoni, tiam estos sufiĉe da voĉoj. Ni jam antaŭparolis kelkajn aferojn, kiel la Faŭlhabersemajnfino kaj Fenikso.

La programo estis *lingvoj*.

Wim Rijnders parolis pri KOD. Li ekkonis pri KOD pere de gazeto *Trouw*, kiu la 5-an de junio 2004 enhavis artikolon pri ĝi. KOD vere estas stranga lingvo. Iel ĝi konsistas el ĉiuj lingvoj de la mondo. Samtempe ĝi havas KOD-lingvaĵon, kio plej similas al dialektoj bazitaj sur naciaj lingvoj.

𐀀𐀁𐀂 𐀃𐀄𐀅 𐀆𐀇𐀈 𐀉𐀊𐀋𐀌𐀍𐀎𐀏𐀐𐀑𐀒𐀓𐀔𐀕𐀖𐀗𐀘𐀙𐀚𐀛𐀜𐀝𐀞𐀟𐀠𐀡𐀢𐀣𐀤𐀥𐀦𐀧𐀨𐀩𐀪𐀫𐀬𐀭𐀮𐀯𐀰𐀱𐀲𐀳𐀴𐀵𐀶𐀷𐀸𐀹𐀺𐀻𐀼𐀽𐀾𐀿𐁀𐁁𐁂𐁃𐁄𐁅𐁆𐁇𐁈𐁉𐁊𐁋𐁌𐁍𐁎𐁏𐁐𐁑𐁒𐁓𐁔𐁕𐁖𐁗𐁘𐁙𐁚𐁛𐁜𐁝𐁞𐁟𐁠𐁡𐁢𐁣𐁤𐁥𐁦𐁧𐁨𐁩𐁪𐁫𐁬𐁭𐁮𐁯𐁰𐁱𐁲𐁳𐁴𐁵𐁶𐁷𐁸𐁹𐁺𐁻𐁼𐁽𐁾𐁿𐂀𐂁𐂂𐂃𐂄𐂅𐂆𐂇𐂈𐂉𐂊𐂋𐂌𐂍𐂎𐂏𐂐𐂑𐂒𐂓𐂔𐂕𐂖𐂗𐂘𐂙𐂚𐂛𐂜𐂝𐂞𐂟𐂠𐂡𐂢𐂣𐂤𐂥𐂦𐂧𐂨𐂩𐂪𐂫𐂬𐂭𐂮𐂯𐂰𐂱𐂲𐂳𐂴𐂵𐂶𐂷𐂸𐂹𐂺𐂻𐂼𐂽𐂾𐂿𐃀𐃁𐃂𐃃𐃄𐃅𐃆𐃇𐃈𐃉𐃊𐃋𐃌𐃍𐃎𐃏𐃐𐃑𐃒𐃓𐃔𐃕𐃖𐃗𐃘𐃙𐃚𐃛𐃜𐃝𐃞𐃟𐃠𐃡𐃢𐃣𐃤𐃥𐃦𐃧𐃨𐃩𐃪𐃫𐃬𐃭𐃮𐃯𐃰𐃱𐃲𐃳𐃴𐃵𐃶𐃷𐃸𐃹𐃺𐃻𐃼𐃽𐃾𐃿𐄀𐄁𐄂𐄃𐄄𐄅𐄆𐄇𐄈𐄉𐄊𐄋𐄌𐄍𐄎𐄏𐄐𐄑𐄒𐄓𐄔𐄕𐄖𐄗𐄘𐄙𐄚𐄛𐄜𐄝𐄞𐄟𐄠𐄡𐄢𐄣𐄤𐄥𐄦𐄧𐄨𐄩𐄪𐄫𐄬𐄭𐄮𐄯𐄰𐄱𐄲𐄳𐄴𐄵𐄶𐄷𐄸𐄹𐄺𐄻𐄼𐄽𐄾𐄿𐅀𐅁𐅂𐅃𐅄𐅅𐅆𐅇𐅈𐅉𐅊𐅋𐅌𐅍𐅎𐅏𐅐𐅑𐅒𐅓𐅔𐅕𐅖𐅗𐅘𐅙𐅚𐅛𐅜𐅝𐅞𐅟𐅠𐅡𐅢𐅣𐅤𐅥𐅦𐅧𐅨𐅩𐅪𐅫𐅬𐅭𐅮𐅯𐅰𐅱𐅲𐅳𐅴𐅵𐅶𐅷𐅸𐅹𐅺𐅻𐅼𐅽𐅾𐅿𐆀𐆁𐆂𐆃𐆄𐆅𐆆𐆇𐆈𐆉𐆊𐆋𐆌𐆍𐆎𐆏𐆐𐆑𐆒𐆓𐆔𐆕𐆖𐆗𐆘𐆙𐆚𐆛𐆜𐆝𐆞𐆟𐆠𐆡𐆢𐆣𐆤𐆥𐆦𐆧𐆨𐆩𐆪𐆫𐆬𐆭𐆮𐆯𐆰𐆱𐆲𐆳𐆴𐆵𐆶𐆷𐆸𐆹𐆺𐆻𐆼𐆽𐆾𐆿𐇀𐇁𐇂𐇃𐇄𐇅𐇆𐇇𐇈𐇉𐇊𐇋𐇌𐇍𐇎𐇏𐇐𐇑𐇒𐇓𐇔𐇕𐇖𐇗𐇘𐇙𐇚𐇛𐇜𐇝𐇞𐇟𐇠𐇡𐇢𐇣𐇤𐇥𐇦𐇧𐇨𐇩𐇪𐇫𐇬𐇭𐇮𐇯𐇰𐇱𐇲𐇳𐇴𐇵𐇶𐇷𐇸𐇹𐇺𐇻𐇼𐇽𐇾𐇿𐈀𐈁𐈂𐈃𐈄𐈅𐈆𐈇𐈈𐈉𐈊𐈋𐈌𐈍𐈎𐈏𐈐𐈑𐈒𐈓𐈔𐈕𐈖𐈗𐈘𐈙𐈚𐈛𐈜𐈝𐈞𐈟𐈠𐈡𐈢𐈣𐈤𐈥𐈦𐈧𐈨𐈩𐈪𐈫𐈬𐈭𐈮𐈯𐈰𐈱𐈲𐈳𐈴𐈵𐈶𐈷𐈸𐈹𐈺𐈻𐈼𐈽𐈾𐈿𐉀𐉁𐉂𐉃𐉄𐉅𐉆𐉇𐉈𐉉𐉊𐉋𐉌𐉍𐉎𐉏𐉐𐉑𐉒𐉓𐉔𐉕𐉖𐉗𐉘𐉙𐉚𐉛𐉜𐉝𐉞𐉟𐉠𐉡𐉢𐉣𐉤𐉥𐉦𐉧𐉨𐉩𐉪𐉫𐉬𐉭𐉮𐉯𐉰𐉱𐉲𐉳𐉴𐉵𐉶𐉷𐉸𐉹𐉺𐉻𐉼𐉽𐉾𐉿𐊀𐊁𐊂𐊃𐊄𐊅𐊆𐊇𐊈𐊉𐊊𐊋𐊌𐊍𐊎𐊏𐊐𐊑𐊒𐊓𐊔𐊕𐊖𐊗𐊘𐊙𐊚𐊛𐊜𐊝𐊞𐊟𐊠𐊡𐊢𐊣𐊤𐊥𐊦𐊧𐊨𐊩𐊪𐊫𐊬𐊭𐊮𐊯𐊰𐊱𐊲𐊳𐊴𐊵𐊶𐊷𐊸𐊹𐊺𐊻𐊼𐊽𐊾𐊿𐋀𐋁𐋂𐋃𐋄𐋅𐋆𐋇𐋈𐋉𐋊𐋋𐋌𐋍𐋎𐋏𐋐𐋑𐋒𐋓𐋔𐋕𐋖𐋗𐋘𐋙𐋚𐋛𐋜𐋝𐋞𐋟𐋠𐋡𐋢𐋣𐋤𐋥𐋦𐋧𐋨𐋩𐋪𐋫𐋬𐋭𐋮𐋯𐋰𐋱𐋲𐋳𐋴𐋵𐋶𐋷𐋸𐋹𐋺𐋻𐋼𐋽𐋾𐋿𐌀𐌁𐌂𐌃𐌄𐌅𐌆𐌇𐌈𐌉𐌊𐌋𐌌𐌍𐌎𐌏𐌐𐌑𐌒𐌓𐌔𐌕𐌖𐌗𐌘𐌙𐌚𐌛𐌜𐌝𐌞𐌟𐌠𐌡𐌢𐌣𐌤𐌥𐌦𐌧𐌨𐌩𐌪𐌫𐌬𐌭𐌮𐌯𐌰𐌱𐌲𐌳𐌴𐌵𐌶𐌷𐌸𐌹𐌺𐌻𐌼𐌽𐌾𐌿𐍀𐍁𐍂𐍃𐍄𐍅𐍆𐍇𐍈𐍉𐍊𐍋𐍌𐍍𐍎𐍏𐍐𐍑𐍒𐍓𐍔𐍕𐍖𐍗𐍘𐍙𐍚𐍛𐍜𐍝𐍞𐍟𐍠𐍡𐍢𐍣𐍤𐍥𐍦𐍧𐍨𐍩𐍪𐍫𐍬𐍭𐍮𐍯𐍰𐍱𐍲𐍳𐍴𐍵𐍶𐍷𐍸𐍹𐍺𐍻𐍼𐍽𐍾𐍿𐎀𐎁𐎂𐎃𐎄𐎅𐎆𐎇𐎈𐎉𐎊𐎋𐎌𐎍𐎎𐎏𐎐𐎑𐎒𐎓𐎔𐎕𐎖𐎗𐎘𐎙𐎚𐎛𐎜𐎝𐎞𐎟𐎠𐎡𐎢𐎣𐎤𐎥𐎦𐎧𐎨𐎩𐎪𐎫𐎬𐎭𐎮𐎯𐎰𐎱𐎲𐎳𐎴𐎵𐎶𐎷𐎸𐎹𐎺𐎻𐎼𐎽𐎾𐎿𐏀𐏁𐏂𐏃𐏄𐏅𐏆𐏇𐏈𐏉𐏊𐏋𐏌𐏍𐏎𐏏𐏐𐏑𐏒𐏓𐏔𐏕𐏖𐏗𐏘𐏙𐏚𐏛𐏜𐏝𐏞𐏟𐏠𐏡𐏢𐏣𐏤𐏥𐏦𐏧𐏨𐏩𐏪𐏫𐏬𐏭𐏮𐏯𐏰𐏱𐏲𐏳𐏴𐏵𐏶𐏷𐏸𐏹𐏺𐏻𐏼𐏽𐏾𐏿𐐀𐐁𐐂𐐃𐐄𐐅𐐆𐐇𐐈𐐉𐐊𐐋𐐌𐐍𐐎𐐏𐐐𐐑𐐒𐐓𐐔𐐕𐐖𐐗𐐘𐐙𐐚𐐛𐐜𐐝𐐞𐐟𐐠𐐡𐐢𐐣𐐤𐐥𐐦𐐧𐐨𐐩𐐪𐐫𐐬𐐭𐐮𐐯𐐰𐐱𐐲𐐳𐐴𐐵𐐶𐐷𐐸𐐹𐐺𐐻𐐼𐐽𐐾𐐿𐑀𐑁𐑂𐑃𐑄𐑅𐑆𐑇𐑈𐑉𐑊𐑋𐑌𐑍𐑎𐑏𐑐𐑑𐑒𐑓𐑔𐑕𐑖𐑗𐑘𐑙𐑚𐑛𐑜𐑝𐑞𐑟𐑠𐑡𐑢𐑣𐑤𐑥𐑦𐑧𐑨𐑩𐑪𐑫𐑬𐑭𐑮𐑯𐑰𐑱𐑲𐑳𐑴𐑵𐑶𐑷𐑸𐑹𐑺𐑻𐑼𐑽𐑾𐑿𐒀𐒁𐒂𐒃𐒄𐒅𐒆𐒇𐒈𐒉𐒊𐒋𐒌𐒍𐒎𐒏𐒐𐒑𐒒𐒓𐒔𐒕𐒖𐒗𐒘𐒙𐒚𐒛𐒜𐒝𐒞𐒟𐒠𐒡𐒢𐒣𐒤𐒥𐒦𐒧𐒨𐒩𐒪𐒫𐒬𐒭𐒮𐒯𐒰𐒱𐒲𐒳𐒴𐒵𐒶𐒷𐒸𐒹𐒺𐒻𐒼𐒽𐒾𐒿𐓀𐓁𐓂𐓃𐓄𐓅𐓆𐓇𐓈𐓉𐓊𐓋𐓌𐓍𐓎𐓏𐓐𐓑𐓒𐓓𐓔𐓕𐓖𐓗𐓘𐓙𐓚𐓛𐓜𐓝𐓞𐓟𐓠𐓡𐓢𐓣𐓤𐓥𐓦𐓧𐓨𐓩𐓪𐓫𐓬𐓭𐓮𐓯𐓰𐓱𐓲𐓳𐓴𐓵𐓶𐓷𐓸𐓹𐓺𐓻𐓼𐓽𐓾𐓿𐔀𐔁𐔂𐔃𐔄𐔅𐔆𐔇𐔈𐔉𐔊𐔋𐔌𐔍𐔎𐔏𐔐𐔑𐔒𐔓𐔔𐔕𐔖𐔗𐔘𐔙𐔚𐔛𐔜𐔝𐔞𐔟𐔠𐔡𐔢𐔣𐔤𐔥𐔦𐔧𐔨𐔩𐔪𐔫𐔬𐔭𐔮𐔯𐔰𐔱𐔲𐔳𐔴𐔵𐔶𐔷𐔸𐔹𐔺𐔻𐔼𐔽𐔾𐔿𐕀𐕁𐕂𐕃𐕄𐕅𐕆𐕇𐕈𐕉𐕊𐕋𐕌𐕍𐕎𐕏𐕐𐕑𐕒𐕓𐕔𐕕𐕖𐕗𐕘𐕙𐕚𐕛𐕜𐕝𐕞𐕟𐕠𐕡𐕢𐕣𐕤𐕥𐕦𐕧𐕨𐕩𐕪𐕫𐕬𐕭𐕮𐕯𐕰𐕱𐕲𐕳𐕴𐕵𐕶𐕷𐕸𐕹𐕺𐕻𐕼𐕽𐕾𐕿𐖀𐖁𐖂𐖃𐖄𐖅𐖆𐖇𐖈𐖉𐖊𐖋𐖌𐖍𐖎𐖏𐖐𐖑𐖒𐖓𐖔𐖕𐖖𐖗𐖘𐖙𐖚𐖛𐖜𐖝𐖞𐖟𐖠𐖡𐖢𐖣𐖤𐖥𐖦𐖧𐖨𐖩𐖪𐖫𐖬𐖭𐖮𐖯𐖰𐖱𐖲𐖳𐖴𐖵𐖶𐖷𐖸𐖹𐖺𐖻𐖼𐖽𐖾𐖿𐗀𐗁𐗂𐗃𐗄𐗅𐗆𐗇𐗈𐗉𐗊𐗋𐗌𐗍𐗎𐗏𐗐𐗑𐗒𐗓𐗔𐗕𐗖𐗗𐗘𐗙𐗚𐗛𐗜𐗝𐗞𐗟𐗠𐗡𐗢𐗣𐗤𐗥𐗦𐗧𐗨𐗩𐗪𐗫𐗬𐗭𐗮𐗯𐗰𐗱𐗲𐗳𐗴𐗵𐗶𐗷𐗸𐗹𐗺𐗻𐗼𐗽𐗾𐗿𐘀𐘁𐘂𐘃𐘄𐘅𐘆𐘇𐘈𐘉𐘊𐘋𐘌𐘍𐘎𐘏𐘐𐘑𐘒𐘓𐘔𐘕𐘖𐘗𐘘𐘙𐘚𐘛𐘜𐘝𐘞𐘟𐘠𐘡𐘢𐘣𐘤𐘥𐘦𐘧𐘨𐘩𐘪𐘫𐘬𐘭𐘮𐘯𐘰𐘱𐘲𐘳𐘴𐘵𐘶𐘷𐘸𐘹𐘺𐘻𐘼𐘽𐘾𐘿𐙀𐙁𐙂𐙃𐙄𐙅𐙆𐙇𐙈𐙉𐙊𐙋𐙌𐙍𐙎𐙏𐙐𐙑𐙒𐙓𐙔𐙕𐙖𐙗𐙘𐙙𐙚𐙛𐙜𐙝𐙞𐙟𐙠𐙡𐙢𐙣𐙤𐙥𐙦𐙧𐙨𐙩𐙪𐙫𐙬𐙭𐙮𐙯𐙰𐙱𐙲𐙳𐙴𐙵𐙶𐙷𐙸𐙹𐙺𐙻𐙼𐙽𐙾𐙿𐚀𐚁𐚂𐚃𐚄𐚅𐚆𐚇𐚈𐚉𐚊𐚋𐚌𐚍𐚎𐚏𐚐𐚑𐚒𐚓𐚔𐚕𐚖𐚗𐚘𐚙𐚚𐚛𐚜𐚝𐚞𐚟𐚠𐚡𐚢𐚣𐚤𐚥𐚦𐚧𐚨𐚩𐚪𐚫𐚬𐚭𐚮𐚯𐚰𐚱𐚲𐚳𐚴𐚵𐚶𐚷𐚸𐚹𐚺𐚻𐚼𐚽𐚾𐚿𐛀𐛁𐛂𐛃𐛄𐛅𐛆𐛇𐛈𐛉𐛊𐛋𐛌𐛍𐛎𐛏𐛐𐛑𐛒𐛓𐛔𐛕𐛖𐛗𐛘𐛙𐛚𐛛𐛜𐛝𐛞𐛟𐛠𐛡𐛢𐛣𐛤𐛥𐛦𐛧𐛨𐛩𐛪𐛫𐛬𐛭𐛮𐛯𐛰𐛱𐛲𐛳𐛴𐛵𐛶𐛷𐛸𐛹𐛺𐛻𐛼𐛽𐛾𐛿𐜀𐜁𐜂𐜃𐜄𐜅𐜆𐜇𐜈𐜉𐜊𐜋𐜌𐜍𐜎𐜏𐜐𐜑𐜒𐜓𐜔𐜕𐜖𐜗𐜘𐜙𐜚𐜛𐜜𐜝𐜞𐜟𐜠𐜡𐜢𐜣𐜤𐜥𐜦𐜧𐜨𐜩𐜪𐜫𐜬𐜭𐜮𐜯𐜰𐜱𐜲𐜳𐜴𐜵𐜶𐜷𐜸𐜹𐜺𐜻𐜼𐜽𐜾𐜿𐝀𐝁𐝂𐝃𐝄𐝅𐝆𐝇𐝈𐝉𐝊𐝋𐝌𐝍𐝎𐝏𐝐𐝑𐝒𐝓𐝔𐝕𐝖𐝗𐝘𐝙𐝚𐝛𐝜𐝝𐝞𐝟𐝠𐝡𐝢𐝣𐝤𐝥𐝦𐝧𐝨𐝩𐝪𐝫𐝬𐝭𐝮𐝯𐝰𐝱𐝲𐝳𐝴𐝵𐝶𐝷𐝸𐝹𐝺𐝻𐝼𐝽𐝾𐝿𐞀𐞁𐞂𐞃𐞄𐞅𐞆𐞇𐞈𐞉𐞊𐞋𐞌𐞍𐞎𐞏𐞐𐞑𐞒𐞓𐞔𐞕𐞖𐞗𐞘𐞙𐞚𐞛𐞜𐞝𐞞𐞟𐞠𐞡𐞢𐞣𐞤𐞥𐞦𐞧𐞨𐞩𐞪𐞫𐞬𐞭𐞮𐞯𐞰𐞱𐞲𐞳𐞴𐞵𐞶𐞷𐞸𐞹𐞺𐞻𐞼𐞽𐞾𐞿𐟀𐟁𐟂𐟃𐟄𐟅𐟆𐟇𐟈𐟉𐟊𐟋𐟌𐟍𐟎𐟏𐟐𐟑𐟒𐟓𐟔𐟕𐟖𐟗𐟘𐟙𐟚𐟛𐟜𐟝𐟞𐟟𐟠𐟡𐟢𐟣𐟤𐟥𐟦𐟧𐟨𐟩𐟪𐟫𐟬𐟭𐟮𐟯𐟰𐟱𐟲𐟳𐟴𐟵𐟶𐟷𐟸𐟹𐟺𐟻𐟼𐟽𐟾𐟿𐠀𐠁𐠂𐠃𐠄𐠅𐠆𐠇𐠈𐠉𐠊𐠋𐠌𐠍𐠎𐠏𐠐𐠑𐠒𐠓𐠔𐠕𐠖𐠗𐠘𐠙𐠚𐠛𐠜𐠝𐠞𐠟𐠠𐠡𐠢𐠣𐠤𐠥𐠦𐠧𐠨𐠩𐠪𐠫𐠬𐠭𐠮𐠯𐠰𐠱𐠲𐠳𐠴𐠵𐠶𐠷𐠸𐠹𐠺𐠻𐠼𐠽𐠾𐠿𐡀𐡁𐡂𐡃𐡄𐡅𐡆𐡇𐡈𐡉𐡊𐡋𐡌𐡍𐡎𐡏𐡐𐡑𐡒𐡓𐡔𐡕𐡖𐡗𐡘𐡙𐡚𐡛𐡜𐡝𐡞𐡟𐡠𐡡𐡢𐡣𐡤𐡥𐡦𐡧𐡨𐡩𐡪𐡫𐡬𐡭𐡮𐡯𐡰𐡱𐡲𐡳𐡴𐡵𐡶𐡷𐡸𐡹𐡺𐡻𐡼𐡽𐡾𐡿𐢀𐢁𐢂𐢃𐢄𐢅𐢆𐢇𐢈𐢉𐢊𐢋𐢌𐢍𐢎𐢏𐢐𐢑𐢒𐢓𐢔𐢕𐢖𐢗𐢘𐢙𐢚𐢛𐢜𐢝𐢞𐢟𐢠𐢡𐢢𐢣𐢤𐢥𐢦𐢧𐢨𐢩𐢪𐢫𐢬𐢭𐢮𐢯𐢰𐢱𐢲𐢳𐢴𐢵𐢶𐢷𐢸𐢹𐢺𐢻𐢼𐢽𐢾𐢿𐣀𐣁𐣂𐣃𐣄𐣅𐣆𐣇𐣈𐣉𐣊𐣋𐣌𐣍𐣎𐣏𐣐𐣑𐣒𐣓𐣔𐣕𐣖𐣗𐣘𐣙𐣚𐣛𐣜𐣝𐣞𐣟𐣠𐣡𐣢𐣣𐣤𐣥𐣦𐣧𐣨𐣩𐣪𐣫𐣬𐣭𐣮𐣯𐣰𐣱𐣲𐣳𐣴𐣵𐣶𐣷𐣸𐣹𐣺𐣻𐣼𐣽𐣾𐣿𐤀𐤁𐤂𐤃𐤄𐤅𐤆𐤇𐤈𐤉𐤊𐤋𐤌𐤍𐤎𐤏𐤐𐤑𐤒𐤓𐤔𐤕𐤖𐤗𐤘𐤙𐤚𐤛𐤜𐤝𐤞𐤟𐤠𐤡𐤢𐤣𐤤𐤥𐤦𐤧𐤨𐤩𐤪𐤫𐤬𐤭𐤮𐤯𐤰𐤱𐤲𐤳𐤴𐤵𐤶𐤷𐤸𐤹𐤺𐤻𐤼𐤽𐤾𐤿𐥀𐥁𐥂𐥃𐥄𐥅𐥆𐥇𐥈𐥉𐥊𐥋𐥌𐥍𐥎𐥏𐥐𐥑𐥒𐥓𐥔𐥕𐥖𐥗𐥘𐥙𐥚𐥛𐥜𐥝𐥞𐥟𐥠𐥡𐥢𐥣𐥤𐥥𐥦𐥧𐥨𐥩𐥪𐥫𐥬𐥭𐥮𐥯𐥰𐥱𐥲𐥳𐥴𐥵𐥶𐥷𐥸𐥹𐥺𐥻𐥼𐥽𐥾𐥿𐦀𐦁𐦂𐦃𐦄𐦅𐦆𐦇𐦈𐦉𐦊𐦋𐦌𐦍𐦎𐦏𐦐𐦑𐦒𐦓𐦔𐦕𐦖𐦗𐦘𐦙𐦚𐦛𐦜𐦝𐦞𐦟𐦠𐦡𐦢𐦣𐦤𐦥𐦦𐦧𐦨𐦩𐦪𐦫𐦬𐦭𐦮𐦯𐦰𐦱𐦲𐦳𐦴𐦵𐦶𐦷𐦸𐦹𐦺𐦻𐦼𐦽𐦾𐦿𐧀𐧁𐧂𐧃𐧄𐧅𐧆𐧇𐧈𐧉𐧊𐧋𐧌𐧍𐧎𐧏𐧐𐧑𐧒𐧓𐧔𐧕𐧖𐧗𐧘𐧙𐧚𐧛𐧜𐧝𐧞𐧟𐧠𐧡𐧢𐧣𐧤𐧥𐧦𐧧𐧨𐧩𐧪𐧫𐧬𐧭𐧮𐧯𐧰𐧱𐧲𐧳𐧴𐧵𐧶𐧷𐧸𐧹𐧺𐧻𐧼𐧽𐧾𐧿𐨀𐨁𐨂𐨃𐨄𐨅𐨆𐨇𐨈𐨉𐨊𐨋𐨌𐨍𐨎𐨏𐨐𐨑𐨒𐨓𐨔𐨕𐨖𐨗𐨘𐨙𐨚𐨛𐨜𐨝𐨞𐨟𐨠𐨡𐨢𐨣𐨤𐨥𐨦𐨧𐨨𐨩𐨪𐨫𐨬𐨭𐨮𐨯𐨰𐨱𐨲𐨳𐨴𐨵𐨶𐨷𐨹𐨺𐨸𐨻𐨼𐨽𐨾𐨿𐩀𐩁𐩂𐩃𐩄𐩅𐩆𐩇𐩈𐩉𐩊𐩋𐩌𐩍𐩎𐩏𐩐𐩑𐩒𐩓𐩔𐩕𐩖𐩗𐩘𐩙𐩚𐩛𐩜𐩝𐩞𐩟𐩠𐩡𐩢𐩣𐩤𐩥𐩦𐩧𐩨𐩩𐩪𐩫𐩬𐩭𐩮𐩯𐩰𐩱𐩲𐩳𐩴𐩵𐩶𐩷𐩸𐩹𐩺𐩻𐩼𐩽𐩾𐩿𐪀𐪁𐪂𐪃𐪄𐪅𐪆𐪇𐪈𐪉𐪊𐪋𐪌𐪍𐪎𐪏𐪐𐪑𐪒𐪓𐪔𐪕𐪖𐪗𐪘𐪙𐪚𐪛𐪜𐪝𐪞𐪟𐪠𐪡𐪢𐪣𐪤𐪥𐪦𐪧𐪨𐪩𐪪𐪫𐪬𐪭𐪮𐪯𐪰𐪱𐪲𐪳𐪴𐪵𐪶𐪷𐪸𐪹𐪺𐪻𐪼𐪽𐪾𐪿𐫀𐫁𐫂𐫃𐫄𐫅𐫆𐫇𐫈𐫉𐫊𐫋𐫌𐫍𐫎𐫏𐫐𐫑𐫒𐫓𐫔𐫕𐫖𐫗𐫘𐫙𐫚𐫛𐫜𐫝𐫞𐫟𐫠𐫡𐫢𐫣𐫤𐫦𐫥𐫧𐫨𐫩𐫪𐫫𐫬𐫭𐫮𐫯𐫰𐫱𐫲𐫳𐫴𐫵𐫶𐫷𐫸𐫹𐫺𐫻𐫼𐫽𐫾𐫿𐬀𐬁𐬂𐬃𐬄𐬅𐬆𐬇𐬈𐬉𐬊𐬋𐬌𐬍𐬎𐬏𐬐𐬑𐬒𐬓𐬔𐬕𐬖𐬗𐬘𐬙𐬚𐬛𐬜𐬝𐬞𐬟𐬠𐬡𐬢𐬣𐬤𐬥𐬦𐬧𐬨𐬩𐬪𐬫𐬬𐬭𐬮𐬯𐬰𐬱𐬲𐬳𐬴𐬵𐬶𐬷𐬸𐬹𐬺𐬻𐬼𐬽𐬾𐬿𐭀𐭁𐭂𐭃𐭄𐭅𐭆𐭇𐭈𐭉𐭊𐭋𐭌𐭍𐭎𐭏𐭐𐭑𐭒𐭓𐭔𐭕𐭖𐭗𐭘𐭙𐭚𐭛𐭜𐭝𐭞𐭟𐭠𐭡

Estis sukcesplena kaj agrabla semajnfino, kaj oni ĝuis la prezentadon de *Kajto*.



Kajto

Wil laŭtlegis tre interesan retmesaĝon, kiun sendis Dennis van der Heijden el Ugando. Venis retmesaĝo ankaŭ de Hans Bakker pri la malagrabla situacio en Togolando. Antaŭ nelonge estis balotado tie, sed ĝi estis tute fuŝita. Multaj homoj viktimiĝis aŭ fuĝis.

Johan ricevis retmesaĝon de s-ino Tiny Nassenstein. Ŝi petis de iu el ni sendi informojn pri la instruadsistemo en Nederlando. Ĉar Johan estas el la ĉeestantoj la nura, kiu havas infanon en lernejo, li okupos sin pri tiu informpeto.

Luit parolis pri la spertoj dum la Liberiĝtago. Ankaŭ ĉi tiun jaron ni kune kun kelkaj anoj de TEJO havis budon en la Groningen-a urboparko.

La 26-an de majo 2005

Pro tio, ke la vetero al ni surprize bonvolis, eblis en picejo *Il lago* manĝi surterase.

Ni apogis nin sur la supozo, ke tie dum labortagoj manĝos ne multaj homoj, sed tamen kolektiĝis tiom da gastoj, kiuj volis ĝui la panoramon kaj la italajn bongustaĵojn, ke la estro insiste rekomendis estontece antaŭmendi, por ke li havu pli da tempo por pretigi la tablojn.

Jam iĝis kutimo antaŭ ol fini la kunvensezonon, ie en la urbo kune manĝi. Dek personoj cedis al la invito aperi je la sepa vespere en la restoracio. Unu el ni estis tiel ravita de la projubilea emblemo de Esperanto Nederland, ke ŝi kopiis ĝin

kelkope por disdoni al la gastoj. Oni tamen interkonsentis ilin ne ĝeni dum la manĝado, sed ja meti la belkolorajn paperojn en la urban bibliotekon aŭ simile.

La picojn kaj la salaton ni bonapetite formanĝis elrigardante de tempo al tempo sur la lagon, kie eĉ ne mankis akvoskianto.

La kelnerino, dum la manĝo sin certigante ĉu la tuto bonordas, alparolis nin per la angla lingvo. Supozante, ke ŝi tion faris tial, ke ŝi, aŭdante fremdan lingvon, ne povas lokalizi nian devenon, ni klarigis al ŝi, ke ŝi ŝparu la penon kaj parolu nederlandlingve. Estis amuze konstati, ke petante pardonon, ŝi eksplikis, ke la angla estas la nura lingvo, per kiu ŝi povas esprimi sin!

Tamen ne ekestis konfuzoj, kaj finmanĝinte, ni restis ankoraŭ iom da tempo por interŝanĝi niajn dumsomerajn planojn.



ĝuante italajn bongustaĵojn

La 4-an de junio 2005

Sesope kaj aŭtomobile ni iris al Rodenkirchen en la nordo de Germanio por festi la dekjaran jubileon de la tiea Esperanto-klubo, kun kies membroj ni unuafoje kontaktis pasintjare dum nia Esperanto-tago en majo. La programo enhavis ŝipekskurson sur la rivero Vesero, tre bone prizorgitan bufedon, prezenton de ŝanti-ĥoro kaj trinkadon de kafo aŭ teo kun tre bongustaj tortpecoj! Ĉeestis 45 personoj, inter ili kelkaj bremenanoj, kiuj estis jam konataj al ni. La etoso estis agrabla, nur la vetero povintus esti pli bona. La temperaturo estis malalta kaj la

vento forta. Pro tio ni iom malsekiĝis de la ondoj, kiuj ŝprucis akvon sur la ŝipon, en kiu ni sidis, kaj la vento blovis jen kaj jen en la tendon, en kiu ni festis.


Johan gratulis la klubon kaj enmanigis kelkajn donacojn, kiujn ni kunportis por la klubanoj. La renkontiĝo tiel plaĉis al ĉiuj, ke ni jam tiuomente decidis denove renkonti unu la aliajn la 17-an de decembro en Oldenburgo por tie kune festi la Zamenhof-tagon.



sur Vezero en la boato *Hanni*

!

Atentu! Volonte ni aŭdos de vi en septembro, kiu ŝatas partopreni tiun **ekskurson al Oldenburgo**, kie ni do renkontos niajn germanajn geamikojn el Oldenburgo, Bremeno kaj Subvisurgo. Ni kune trinkos kafon, verŝajne vizitos ekspozicion en la kastelo kaj kune manĝos. Poste ni havos okazon viziti la kristnaskajn budojn en la centro de la urbo. Ni vojaĝos per aŭtoj aŭ per aŭtobuso. Tio dependos de la nombro de la aliĝintoj.



Somerperiodo

Niajn renkontojn en la somerperiodo vizitis respektive 3 kaj 7 personoj. La vetero ne estis tiel, ke ni povis trinki kafon ekstere, nek en la Scandinavisch Dorp nek en la Schimmelpenninckhuis. Ni babilis pri niaj travivaĵoj kaj iomete jam pri la okazontaĵoj en la nova klubperiodo. Estis agrablaj renkontiĝoj.

LA VERDA STELO haveblas por membroj kaj abonantoj ne nur papere, sed ankaŭ en PDF-strukturo. Bezonata estas Acrobat-legilo, senkoste elŝutebla de Interreto.

Se vi ŝatus ricevi ĝin en tia formo kiel aldonaĵon, vi petu kopion de la redakcio retroŝte:

koosscharroo@home.nl



Kongresa raporto...

La Esperanto-kongreso en Vilno, en kiu mi partoprenis, finiĝis la 30-an de julio kaj pro tio post 3-taga turisma postkongreso ankaŭ miaj ferioj. De Litovio mi vidis multe. La lando estas pli okcidenta ol mi supozis. En Vilno troviĝas multaj novaj belaj altaj konstruaĵoj kaj estas belegaj grandaj butikoj. Kaŭnas estas malpli renovigita, sed ankaŭ tie oni renovigadas. Klaipeda estas havenurbo kun terlangoj antaŭ ĝi, simile al niaj *Waddeneilanden*. Mil homoj sur ĝi loĝas, sed somere multe pli kiel turistoj. Estas sur ĝi bela strando, kaj estis ebleco por ni naĝi tie en la Balta Maro. Tiu naĝado tre plaĉis al mi. Partoprenis en la kongreso 2344 personoj el 60 landoj. La grandaj eventoj, kiel la malfermo, la fermo, nacia kaj internacia vesperoj okazis en la Siemens Arena, kien ni estis transportitaj per aŭtobusoj. Koncertoj kaj teatraĵo estis prezentitaj en iu teatro kaj ĉiuj prelegoj, kursoj kaj aliaj aktivaĵoj okazis en la kongresejo. Ĉiu partoprenanto fakte travivas sian kongressemajnon alimaniere, elektante el la skemo kun eblecoj tion, pri kio oni interesiĝas.



Ĉiuj eroj, en kiuj mi partoprenis, tre plaĉis al mi. Merkredo estas kutime la ekskurstago, dum kiu ne estas aktivaĵoj en la kongresejo mem. Estas agrable ĉie renkonti esperantistojn, kun kiuj eblas kontakti kaj paroli en kaj ekster la kongresejo.


Ĉiam impresas min la fakto, ke la nepo de Zamenhof alparolas kaj salutas la ĉeestantojn dum la inaŭguro.

Preskaŭ tuj post mia alveno en la kongresejo petis Ans Bakker ankaŭ de mi saluti la kongresanojn nome de la nederlandaj esperantistoj. Nur tre mallonge vi salutu, ŝi diris.

Mi akceptis la peton kaj salutis ĉi-maniere: *Karaj ĉeestantoj, la nederlandaj esperantistoj kore salutas vin, same kiel la nederlandlingvaj kursanoj, kiuj studas Esperanton pere de Interreto.*

Tiel ankaŭ la kursanoj iomete partoprenis la kongreson!

Wil van Ganswijk-Vlasblom



Ekzistas ekde la 10-a de julio reta versio de la famkonata *Esperantosleutel*. Esperanto Nederland metis tuj post la apero ligilon en sian retpaĝaron. Multaj jam vizitis ĝin: plej multe en la 13-a de aŭgusto. Tiam estis 43 vizitantoj. Ĉiutage venas 21 vizitantoj averaĝe. Ne nur de Nederlando mem kaj Belgio, sed ankaŭ de Saŭdiarabio, Svedio, Usono kaj Japanio!

Vi trovos la Esperanto-ŝlosilon jene:
<http://members.home.nl/koosscharroo/sleutel>

aŭ rigardu la retpaĝon de *Esperanto Nederland*
<http://www.esperanto-info.nl>

(alvoko el Francio)

Karaj geamikoj!

Mi klopodas prepari asocian forumon en mia urbeto en septembro. Komence de la lerneĵ-jaro ĉiuj asocioj (sporta, muzika, kultura) prezentiĝas dum unu tago en sporthalo. Ĝepatroj kaj infanoj venas kaj elektas la agadojn, kiuj plaĉas al ili. Agadoj estas por infanoj, sed ankaŭ por junuloj kaj plenkreskuloj.

Mi provas starigi Esperanto-kursojn. Mi jam aperigis artikolon en la urbegazeto kaj disdonis ĉie en la urbo verdajn flugfoliojn, kiuj prezentas Esperanton, ĉar ekzistas homoj tie ĉi, kiuj neniam aŭdis pri Esperanto.

Por montri la utilecon kaj bonan funkcion de Esperanto, mi ŝatus prezenti dosieron de bildkartoj el la tuta mondo kun la franca traduko de la Esperanta teksto.

Ĉu vi bonvolus helpi min kaj sendi al mi bildkarton el via lando kun mallonga Esperanta teksto?

Multan dankon jam nun!

Amike,

Bea

Beatrice Allee
La ville Heleuc
F - 22980 Plelan-le-Petit

Ankaŭ mi sendis bildkarton, kaj ŝi tre ĝojis pri tio.

Koos Scharroo

Ne ekzistas 'la' ĉina lingvo.

Nova gramatiko celas ankaŭ komencantojn

Pro tio, ke la mandarenan lingvon parolas 875 milionoj da homoj, ĝi certe estas la plej granda lingvo en la mondo. La ĉinologo *Jeroen Wiedenhof* verkis grandan kaj alireblan gramatikon, kiu baziĝas sur la parolata lingvo.

Foje oni demandas: *Ĉu ankaŭ la ĉina ŝanĝiĝas?* Tiun demandon opinias Jeroen Wiedenhof stranga. Ĉiuj lingvoj ŝanĝiĝas, kial do ne la ĉina? "Rigardu tion, kio okazis la pasintan jarcenton: En 1912 ĉesis la imperio kaj fondiĝis la respubliko. En 1949 okazis komunisma revolucio kaj poste, en la periodo de 1966 ĝis 1976, la t.n. Kultura Revolucio. Kaj fine, en la okdekaj jaroj, la ebleco de liberaj kontaktoj kun la okcidenta mondo. Periodoj, en kiuj la lingvo multe ŝanĝiĝis unuflanke, kaj pro tio, ke la areo estas grandega, ekzistas multaj regionaj varioj aliflanke." La ĉina, kiel unusenca lingvo, ne ekzistas. Tio, kion oni nomas la ĉina, fakte estas aro de sep lingvoj, el kiuj la mandareno estas la plej granda kaj la lingvo oficiala de Ĉinio, Tajvano kaj Singapuro. Ankaŭ mondscale ĝi estas la plej parolata lingvo, estante ĉirkaŭ dufoje pli granda ol la angla, la hispana, aŭ la hinda.

Laborante en la universitata Ĉinologia Instituto de la urbo Leiden, Wiedenhof publikigis de la mandarena lingvo grandan gramatikon, kiu celas ne nur nederlandanojn, kiuj klopodoas ellerni la lingvon, (kaj komencantojn kaj progresantojn), sed ankaŭ tiujn, kiuj interesiĝas pri lingvoj ĝenerale. Ankaŭ por tiuj nederlandanoj, kiuj ne scias de la ĉina eĉ unu vorton, la libro tre legeblas kaj eksplikas tion, el kio la lingvo konsistas.

Lia deirpunkto estis tiel priskribi la mandarenan, kiel ĝi estas efektive parolata. Tio ŝajnas logika, sed gramatiklibroj emas malfrui la aktualan lingvan evoluon. Certe se paroli pri la mandarena lingvo. Wiedenhof diras: "La ĉinan oni skribas

jam dum miloj da jaroj, kaj postrestis multe da malnova literaturo. Sekvo de tio estas, ke ĉiam gravas nur la skribo, kiu ne estas iu ajn skribo, sed la ĉina, kiu ne estas rekta reprodukto de la sono."

La skribata kaj la parolata lingvoj tre malsamas. Tion rimarkis Wiedenhof mem, kiam li iris al Pekino post tri jaroj da studado. Montriĝis, ke foje li ne komprenis la plej kutimajn frazojn, kiel 'He, kion vi faras?' En la universitato li lernis: *Ni zuo sheme?* (Vi faras kion?). Sed en Pekino oni plej ofte diras: *Gan ma, ni?* (Faras kion, vi?), kio estas alia verbo, alia vorto anstataŭ *kion*, kaj ankaŭ alia vortordo. "Estas strange, ke kvankam la frazo estas tre simpla kaj ĉiutaga, eĉ post tri jaroj da studado mi ne komprenis ĝin", li diris.

Li ja metis tiun frazon en sia libro. La metado je la fino de la vorto *vi* estas ĉarma. Tio okazas ankaŭ en la nederlanda lingvo. *Leuke jongen, die Kees. Ik heb hem niet gezien, je fiets.* Oni aldonas ion poste, kiel pliklarigon. Tio okazas ankaŭ en la mandarena lingvo, kaj li havas la impreson, ke estas kutimo tiel paroli. Kelnero en restoracio diras ekzemple, kiam la gastoj estas forirontaj: *foriru malrapide, vi.* Li volas diri: *ne hastu, ne urĝu vin, ĝis revido.* Tio iĝis respektoformo, almenaŭ en Pekino.

Alia ekzemplo. Kiel estas en multaj lingvoj, ankaŭ en la mandarena oni ne diras: *li estas sportisto*, sed sufiĉas diri: *li sportisto.* (ta yundongyuan). Tamen, ĉino tute ne povas imagi, ke oni skribas ĝin tiamaniere, sen la ideogramo, kiu signifas *estas*. "Tion oni renkontas nur en eksperimenta poezio aŭ hipermodernaj rek-



lamoj”, diras Wiedenhof, “sed ne en gramatik-libroj, ĉar oni ne tiel skribas. Lingvaj reguloj estas striktaj, kaj la ĉina instruado estas tre metoda. Tio, kion diras la instruisto, estas vera. Kaj kio estas en la libroj ankoraŭ pli. Kompreneble, en la nederlanda lingvo malsamas la skribata kaj la parolata lingvaĵoj. Sed kiam oni legas la Ĝeneralan Nederlandan Gramatikon, troviĝas tie sufiĉe da parolata lingvaĵo.”

Estante en Pekino, Wiedenhof ĉiam kunportas notkajeron. Aŭdinte ion novan aŭ rimarkindan, li tuj tion notas en ĝin.

“Tio estas bona metodo registri vortojn kaj esprimojn”, li opinias.

“Sed tio ne uzeblas, se temas pri la frazkonstruo de la mandarena parolata. Tiam oni surbendigu ĉiutagajn konversaciojn.”

Li faris ankaŭ tion. En la komenco de la naŭdekaj jaroj por sia doktoriĝo li

surbendigis konversaciojn, de kiuj li poste precize transskribis 5000 frazojn en la pinjinon, kiu estas latinida alfabeto por la transskribo de la ĉinaj ideogramoj.

“Oni vidu ilin surpapere”, li diris. “Tiam frapos la okulojn ĉiaj gramatikaĵoj nenie troveblaj en iu ajn vortaro aŭ gramatiko, kiel ekzemple verbo signifanta *ne esti*. Strange estis, ke neniu kredis tion, kiam mi ekpublikigis ilin. Ĉar ne ekzistas por ili iu ajn ideogramo. Pro tio, ke oni ne kapablas ilin skribi, tial ili ne ekzistas. Pro tio mi mem devis elpensi iun ideogramon.”

Nederlandanoj plej ofte opinias la ĉinan tre malfacile lernebla. “La skribo estas granda obstaklo”, konfirmas Wiedenhof. “Kaj krome ekzistas la tonsistemo.”

La mandarena estas tonlingvo: la silaboj estu elparolataj je difinitaj tonalto kaj modulado. Depende de tiu *tono* signifas la silabo *shu*: *libro*,

matura, *nombri*, aŭ *arbo*. Vorto, kiun oni ne prononcas ĝustatone, estas por ĉino nekomprenebla.

Ĉiujare Wiedenhof kutimigu novan grupon de studentoj al tiu tonsistemo.

“Temas ne nur pri la tonalto, sed ankaŭ pri sonforto kaj rapido. Do pri alta/malalta, laŭta/mallaŭta, kaj rapida/malrapida. Se oni volas tion ekspliki al nederlandanoj, tiam ekzistas nur unu komparo: la intonacio de frazo, kiun oni uzas por esprimi ekz-e furiozon aŭ miron, sed ankaŭ por indiki, ke la frazo estas demando. ‘Fromaĝo!’ sonas alie ol ‘Fromaĝo?’. Mi

klopodas konsciigi miajn studentojn, kion ili faras en la nederlanda per intonacio: ‘Kaas?’ – kio okazas en tiu frazeto? La tono altiĝas. Nu, tio estas pli-malpli la dua tono de la mandarena. Kaj ‘Bah!’ en ‘Bah, wat vies!’ estas proksimume la kvara tono.”

Lerni lingvojn plej bone

estas laŭ Wiedenhof simple ripeti, kaj, laŭ lia sento, multe troigi.

“Mi kuraĝigas la studentojn troigi. Surmetu tiun kapaŭskultilon kaj ripetu, eĉ senkomprene. Oni al kutimiĝu al tiuj novaj sonoj kaj renkontu ilin kiel infano. Ankoraŭ ne analizu. Kaj kuraĝu troigi. Elmontri tian ludemon ne kapablas ĉiuj plenkreskuloj.”

Se temas pri tono, malgrandaj infanoj jam estas sufiĉe sentemaj. Antaŭ la unua vorto, ili jam sukcesas komuniki per intonacio. Spiregante altatone ‘h! h! h!’ ili indikas, ke ili ion ajn deziras. Kaj malalta, nekontenta ‘mmmmm!!’ signifas: ne!

“Kelkaj studentoj esploras la lingvon analitike”, diras Wiedenhof. “Aliaj laŭ intuicio. Tiuj lernas plej rapide: ili ankoraŭ povas agi infane. Sed ili ne kapablas ekspliki kion ili faras.”

Kio pri frazkonstruo? En la mandarena ne ekzis-



tas konjugacioj aŭ deklinacioj. Oni dirus: tio estas facile, ĉar la vortojn *kuri, kuras kuris, kuranta, kurinta* oni tradukas per nur unu vorto. Same kiel *amiko, amikino, amikoj* kaj *amikinoj*. La mandarena plej ofte ne distingas inter la pasinteco, la nuno kaj la estonteco nek inter la vira kaj ina sekso, kaj ankaŭ ne inter singularo kaj pluralo.

“Tiurilate ambaŭ lingvoj forte diferencas”, diras Wiedenhof. “Se oni intencas iun vesperon diboĉi, oni ne povas preterlasi, ĉu kun amiko, ĉu kun amikino, ĉu kun grupo de amikoj, aŭ ĉu grupo de amikinoj. La strukturo de nia lingvo devigas al ni tion eksplicite. En la mandarena ĉiam eblas lasi tion nedecidita. Se necesas, eblas diri ekzemple *grupo de amikoj*, kio laŭvorte estas *grupo amiko*. La problemo por nederlandanoj estas, ke ili ofte parolas la ĉinan tro korekte, durante ĉiufoje *amiko grupo*, se temas pri *amikoj*. Eĉ tiam, se tio ne estas aferkoncerna. Tion oni dekutimigu al si.”

Nederlandanoj nur kun peno liberigas sin de la verbotempoj. “Oni ĉiam volas esprimi, kiam la ago plenumiĝas, rilate la nunon. Pri tio oni daŭre okupiĝas, kaj tion oni ĉiam enplektu en la verbon. En la mandarena tio ne bezonatas, kio en la komenco sentigas nekutima aŭ fremda, kvazaŭ vi estus perdinta la punkton de orientado. Oni ripetfoje emas diri: tio okazis hieraŭ. Ankaŭ tion oni mallernu.”

Aliflanke, en la mandarena oni ja esprimas aliajn tempindikojn, nome kiamaniere la ago aŭ okazaĵo plenumiĝas, aŭ en la tempo troviĝas (neligita kun la nuno). Simplan frazon, kiel *la akvo bolas* oni povas diri dumaniere. Laŭ tio, ĉu ĝi jam bolas dum iom da tempo, aŭ ĉu ĝi ĵus ekbolas. Tiajn nuancojn oni esprimas per malgrandaj vorteroj, kompareblaj kun la nederlandaj vortoj *al, nog* en *pas*. Estas malfacile mastri tiujn nuancojn, kiuj svarmas en la mandarena. Ekzistas plia diferenco. Nederlandanoj kutimas konstrui frazojn ĉirkaŭ subjekto kaj predikato, kies rilato estas la fundamento de la frazo. En la mandarena temas pri alia centra rilato, nome tiu

inter *temo* kaj *komento*. Wiedenhof donas kiel ekzemplon la frazon *Nuli mai* (sklavo vendi). “Nederlandano facile interpretas tion jene: *la sklavo vendas ion*, sed tio ne nepras. Ĝi povas signifi ankaŭ: *la sklavo estas vendita*. Tia frazo signifas ne pli ol: tempas pri iu sklavo kaj pri vendado. Ĝi povas esprimi ĉiajn ideojn: *la sklavo ĝin vendas, ni vendas la sklavojn, interŝange de sklavoj ni ĝin vendas, ni vendas ĝin al la sklavoj*, ktp. La kunteksto plej ofte klarigas pri kio temas. Se oni volas esprimi sin pli eksplicite, la mandarena abundas je ebloj. Sed se ne bezonatas, oni ne faras.”

Ankaŭ tiurilate nederlandanoj emas fari frazojn tro multvortajn.

Se la mandareno estas tiel malfacila por nederlandanoj, ĉu tiam la nederlanda estas tia por ĉinoj? Wiedenhof ridas: “Jes, ĉar tiam temas pri la samaj aferoj, sed inverse. Singularo, pluralo. Ina, vira. La verbotempoj. Ĉinoj opinias niaj grupigitajn konsonantojn malfacilaj, ekz-e *pr, str, kl*, kaj ankaŭ la fakton, ke la nederlanda havas tiom da vokaloj. Ili malfacile liberigas sin de la tonsistemo.

Komencantoj lernas nederlandajn vortojn ĉiam je difinita tono. La vorto ‘boek’ ĉiam do elparolatas je alta tono, kio sonas strange en niaj oreloj.

Jeroen Wiedenhof

‘Grammatica van het Mandarijn’

Amo kun majusklo 'A'.



Maljuna viro vizitis klinikon, kie mi laboras kaj kie mi zorgis pri lia vundita mano. Li diris, ke li hastas, por ke li plenumu gravan devon. Prizorgante lian manon, mi demandis lin pri la kaŭzo de lia hasto. Li respondis, ke li rapidis al maljunulejo, kie li ĉiutage vizitas sian edzinon, kiu nuntempe tie loĝas, por trinki matenan kafon kune kun ŝi. Mi eksciis ankaŭ, ke lia edzino jam estas tie kelkajn jarojn. Fininte la prizorgon de lia mano, mi demandis, ĉu lia edzino ne maltrankviliĝus, kiam li alvenos pli malfrue.

"Ne", li respondis, "ŝi jam ne scias, kiu mi estas. Jam preskaŭ 5 jarojn ŝi ne rekonas min."

Surprizite mi ankoraŭ demandis lin:

"Sed se ŝi ne rekonas vin, kial vi bezonas esti tie ĉiun matenon?"

Rigardante min, li ekridetis kaj diris:

"Jes, ŝi ne scias, kiu mi estas, sed mi ja bone scias, kiu estas ŝi."

Tio venigis al mi larmojn en la okulojn, kaj kiam li foriris, mi diris al mi mem:

"Ĝuste tio estas la amo, kiun mi dezirus en mia vivo."

Vera amo estas ne nur fizika aŭ romantika, sed ĝi signifas akcepti ĉion, kio estas, estis kaj estos.

P. Juan

tradukis Olga Glendová, korespondamiko de nia membrino Tiny Nassenstein.

Diraĵoj pri la internacia lingvo Esperanto.

Esperanto estas la plej bona solvo de la internacia lingvoproblemo.

Albert Einstein

La plej grava estas mia konvinko pri la absoluta neceso de Esperanto.

L. Tolstoj

Esperanto estas grava inventaĵo kun grandegaj ebloj.

Rabindranath Thakur

Mi ne dubas, ke la admirinda facileco de la gramatiko kaj la riĉeco de vortfarado faros la kreinton de Esperanto senmorta.

K.E. Ciokovskij

Esperanto estas majstra verko de logiko kaj simpleco.

El deklaro de 21 membroj de la franca akademio de sciencoj

La subskribintaj konstatas, ke establigo de Esperanto por eldonado de sciencaj verkoj estas tre efika rimedo por internacia kunlaborado.

El proklamo de 85 japanaj sciencistoj

Pripensante la sekvojn de iu internacia lingvo kiel dua lingvo por ĉiuj, oni ne povas kompari ilin kun io alia ol kun tiuj de la invento de presarto kaj ties influo sur la kultura vivo de nacioj.

Theodor Kilián

Plej utila estis Esperanto dum mia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo.

Olav B. Adreson, lektoro de sveda universitato, Lund.

Mi ŝatas Esperanton. Estus bone, se Unuiĝintaj Nacioj realigus iniciaton instrui Esperanton kiel devigan lernobjekton en lernejoj tutmonde, por ke ĝi estu la dua lingvo por ĉiuj.

H. Kilián Laxness, islanda verkisto. En 1955 li gajnis Nobelpremion.

Estus bone, se malgrandaj nacioj, do ankaŭ nia, dediĉus ĝuste al Esperanto pli grandan atenton.

Janis Rainis, latvia poeto

Esperanto estas kreita laŭ sanaj filologiaj principoj. Tial ĝi povos daŭre progresi kaj pliriĉiĝi.

W.E. Collinson, angla lingvosciencisto

La diraĵojn kolektis *dr-o František Nosek* el Prago.

Tradukis ilin *Olga Glendová* el Prago, korespondamikino de nia membrino Tiny Nassenstein el Francio



Esperanto-klubo GRONINGEN-DRENTE
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen